

FLANDRA KATOLIKO

MAANDBLAD VAN HET
KATHOLIEK VLAAMSCH
ESPERANTO VERBOND

K. V. E. V.



MONATA REVUO DE LA
FLANDRA UNUIĜO DE
KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ

F. U. K. E.

REDAKTIE : TURNHOUSCHE BAAN, 277, BORGERHOUT (ANT.)
INTERŜANĜ ADRESO : F. U. K. E., TURNHOUSCHEBAAN, 277, BORGERHOUT

Sub la verda stelo

BILETO DE LA PREZIDANTO

Kelkaj anoj plendis pri la lastaj artikoloj en F. K., kiujn ili taksas atakoj kontraŭ la « neŭtraluloj ». Mi tuj diru ke mi tute ne ŝatas atakojn kontraŭ samideanoj de kiu ajn opinio ili estu, sed ĉiu komprenos ke ni ne povas kisi sur ambaŭ vangoj kaj enirigi en nian domon la fanatikajn redaktorojn de « Popola Fronto », la revuo, kiu grandskale estas propagandata en nia lando kaj kiu atakas sur ĉiu linio niajn plej bonajn sentojn, religiajn. Ni ne celas pravigi Franco'n nek Caballero'n, ni abomenas militon, sed ni ne toleros ke oni superŝutu nian pastraron, niajn episkopojn per ĉiaj malveraj, nepruvataj, malbonodoraj rakontoj kaj akuzoj, ĉar ni bone scias ke ili devenas el Moskovo, kie oni diras « Religio estas opio por la popolo ».

Cetere nia religia konsilanto atentigas nin je la fakto ke « Popola Fronto » kaj ĉiuj socialistaj revuoj estas malpermesataj kiel legajo laŭ la « Indekso ». Do, en la fajron kiam ili alvenas !

Nu, ni opinias ke la neŭtrala movado, ĉefe sub la influo de la « interna ideo », kiun ni, katolikoj, ne akceptas, staras tro simpatie rilate al tiuj teorioj, legigas tiujn revuaĉojn en siaj kluboj, kaj ne vidas la danĝerojn de tiuj perdigaj teorioj por la katolikaj gelegantoj.

Cetere nia celo, skribante pri la neŭtrala movado, tute ne estas malhelpi al u ajn asocio enlanda nek eksterlanda, sed nur atentigi niajn proprajn anojn je la danĝeroj, kiuj kuŝas en neŭtralaj asocioj por ke ili restu ĉe ni, konvinkigu pri nia praveco kaj propagan-

du nian katolikan unuiĝon en katolikaj medioj.

Ĝio ne signifas ke niaj spertaj membroj, sufiĉe kleraj por distingi la tritikon el la grenventajo, ne povas kunlabori sur neŭtrala kampo al disvastiĝo de Esperanto, speciale en nia lando, kie la plimulto de la neŭtrala movado formiĝas el katolikaj personoj.

Sed unualoke ni laboradu por nia katolika idealo kaj provu enkonduki la helplingvon en ĉiuj katolikaj medioj kie nur ni kapablas eniri, kaj ni ne forgesu nian regularon kiu tekstas pri niaj celoj « helpi al la interesoj de nia Religio kaj al tiuj de la flandraj katolikoj pere de la lingvo internacia ».

Se kunlaborado kun neŭtralaj asocioj estas petata aŭ ŝajnas oportuna, fidu al via estraro, skribu al mi, por ke ni juĝu kaj decidu. Tiamaniere ni evitos multajn malfacilaĵojn aŭ rakontojn, kiuj facile kondukas al konfliktoj ĉiam senutilaj.

Cetere en nia katolika kampo restas sufiĉe da fareda laboro por ne devi rigardi dekstren nek maldekstren. ANTAŬEN estu nia devizo !

Lic. L. CALLOENS.

La Esperanto-mondo

NI IRIS AL KONGRESO

(Daŭrigo)

Je la oka, ni ree kunvenis en la ĉiŝoje brile lumigita Ridderzaal por la FEST- KAJ INTERKONATIĜA VESPERO : ni ja jam renkontiĝis antaŭe, sed ĉi tie grupiĝis libere ĉirkaŭ la tabloj dum ludado de la orkestro en gaja atmosfero. S-ro Brouwer enkondukis kaj lerte gvidis la vesperon. Post Polonaise dan-

cita tra la salonego, li donis la parolon al Lia Dekana Moŝto Jongen, el Echt (Limburgo, Ned.), kiu alportis krom la salutoj de cent seminarianoj, la apostolan benon de Mon-sro Lemmers, episkopo de Roermond.

Alterne sekvis diversaj salutparoladoj — inter kiuj unu de dekjara nederlanda knabo, tre aplaudita —, kelkaj sukcesintaj plastikaj dancoj de F-ino Simonis, kaj kantoj de F-ino Deckers kaj de Sro de Jong el Heerlen. Aparte menciindaj estas la du belegaj kantoj de eindhovena kvarteto gvidata de Sro P. A. Schendeler. Intertempe la kongresanaro dancis en parto de la salonego el kiu oni forprenis la tapiŝojn; mi supozas ke tion kutime ne faras la senatanoj kaj parlamentanoj dum iliaj kunvenoj, sen tio ili jam estus adaptintaj la plankon. Intertempe ankaŭ S-ro Brouwer faris kelkajn komunikojn inter kiuj estis akceptataj per unuanima aplaŭdego la dankvortoj al la ĉefredaktoro kaj al la kunlaborantoj de Residentiebode kiu aperigis specialan eldonon kun tuta Esperanto-paĝo entenanta ampleksajn raportojn pri la kongreso kaj gravajn mondvavaĵojn en Esperanto, krom la simpatiaj raportoj nederlandlingvaj, kaj kiu prizorgos dumkongrese tian eldonon ĉiutage.

Plej bone interkonatiĝis kun ĉiu Frato Wigbertus van Zon dum sia daŭra ĉirkaŭvagado por kolekti abonojn al Espero Katolika, sed lin serioze konkurencis ĉifoje iu FUIKE-ano, kiu disvendis italajn paketojn tra la salonego (ĉu VI jam havas vian? atentu! ne plu restas multaj.).

Je la dekdua, Sro Brouwer dankis ĉiujn kunlaborintojn kaj ĉeestantojn kaj fermis la agrablan vesperon.

Mardon, la tago komenciĝis por ni je la 8,30a h. per **S. Meso** celebrata de Kanoniko Dro G. Rotondo el Bari (Italujo). Kanoniko Rotondo estas tipa kaj simpatia figuro el niaj kunvenoj; li speciale tre fieris dum ĉi-tiu kongreso, kiel Kanoniko de la Baziliko de S. Nikolao, la granda internacia patrono de la ŝipistoj, en Bari, ĉar la dua kongrestemo koncernas maraferojn. La predikon faris P. C. A. Ouwendijk el Dordrecht pri « la glavo de la spirito », kiu estas la vorto de Dio; « ... ĝi estu, kun la amo de Kristo, nia atakarmilo en la batalado kiu estas la vivo de la homo sur la tero », dum nia defendarmilo estu la « armajo de Dio, la vero, la justeco, la batalemo, la ŝildo de la

Kredo, la Savo ». Ni akiru nian glavon per la preĝado kaj tiam sekvu nian standardon, kiu estas la verda stelo sed kun la brilanta kruco, en kiu signo ni venkos per la homa eltrovaĵo Esperanto en la Nomo de Jesu-Kristo kiu vivas kaj regnas en la jarcentoj de la jarcentoj. »

Je la 10,30-a h., la Prezidanto S-ro Heilker malfermis la

Unuan Laborkunsidon de la Kongreso, dum kiu la Rev. Pastro H.J.A.M. Eras, paroĥestro en Vught (Ned.) pritraktas la kongrestemon: « LA KATOLIKO EN LA PUBLIKA VIVO ». Ni povis ĝui belegan kaj impresan paroladon, kiun mi tamen ne kuraĝas resumi per certe ne perfidi ĝian altan spiritan signifon; ĝi aperas kompleta en Espero Katolika kaj estas legota entute; jen la kvar tezoj de tiu temo:

1. Ĉiu Katoliko — do ankaŭ la laiko — en la publika vivo estas vokata al Apostolado. Li havas la devon prediki la Evangelion, la doktrinon de Kristo; kaj la profunda motivo por ĉi-tiu devo ni trovas en la naturo de la Sankta Eklezio kiel mistika korpo de Kristo.

2. La plejaltcelo de ĉi-tiu apostolado estas la propagando kaj la fondo de regado de Kristo — ne nur en individuo kaj familio —, sed super ĉio en la homa socio.

3. Tiu regado de Kristo estu fondata en la socia vivo:

a) per nia katolik-kultura agado, kiu ebligas kaj konfirmas la kristanajn edukadon kaj klerigadon;

b) per nia katolik-sociala agado, kiu plinoblighas nian laboron pro plialtaj motivoj kaj bonekomprenita fratamo;

c) per nia katolik-politika agado, kiu havas la taskon tiel prizorgi la teran bonfarcon de la tuta homo, ke ĝi estu la preparado por lia eterna destino.

4) Ni havu altan idealon: Kristo kaj la fondo de Lia Regno en ĉiuj klasoj kaj rangoj de homa socio.

La parolanto tre akcentis ke niaj katolikaj interesoj fakte povas esti atingitaj nur se la Katolikoj formas unuon sur ĉiu tereno, kaj Sro Heilker aldonis ke de la travivo de la Katolikismo en la publika vivo dependas la bono kaj la prospero de la homaro.

Sekvis interesa diskuto kiun komenciĝis Sro Golobič (Jugoslavujo) akcentante ke ni devas esti katolikoj en la koro kaj en la

vivo. Sro Duffaud (Francujo) ne povas akordiĝi kun la politika parto de la tezoj de P. Eras: ekestas vigla diskuto inter Sro Duffaud kaj Sro Heilker pri la neceso de memstara katolika politika partio. Prof. Dro Hewera (Ĉeĥoslovakujo) konsilas ke en landoj kie la katolikoj ne povas agi politike, ili despli agu socie, kulture kaj karitate. Post tio la tezoj de P. Eras estis entute unuvoĉe akceptataj neŝanĝitaj.

Antaŭ ol fermi tiun kunvenon, la Prezidanto laŭtleĝis la respondotelegramon de la Regina Moŝto.

Je la 3,30a h. tiun posttagmezon, nin atendis specialaj tramoj sur la Plein apud la Kongresejo por nin konduki al la Komunuma Muzeo kien ni invitis la **URBESTRARO** al **AKCEPTO**. Ni haltis antaŭ granda nova konstruaĵo, ĉirkaŭita de ĝardenoj kaj akvobasenoj, bongustie — laŭ mi — modernlinia, tiel ekstere kiel interne. Nin atendis en la supra halo la Urbestro Dro S. J. R. de Monchy kaj la skabenoj Snoeck, Henkemans kaj Ing. Van de Bilt, skabeno de Instruado. Ni ankaŭ notis inter la ĉeestantaro Lian Ekscelencon Dron L. N. Deckers, eksministron; Inĝenieron M. H. Damme, Direktoron ĝeneralan de la P.T.T. kaj Sron Groeneyk de la P.T.T., Jhr Dron L. van Nispen tot Severnaer, ĉefredaktoro de Residentiebode.

La Urbestro nin salutis kaj bonvenigis per aprita esperantlingva parolado.

Li rememorigas ke nuntempe okazas multe da internaciaj renkontoj en Hago — inter ili, morgaŭ malfermiĝos kongreso por kompara juro (mi esperas por ĝi ke efektive oni povos ion kompari malgraŭ lingva diverseco: aŭ ĉu fakte ili alprenos iun lingvon kiel oficialan kongreslingvon, eble malhelpante unuj klare esprimiĝi kaj aliaj bone kompreni?) — kaj hodiaŭ li akceptas reprezentantojn de movado, kiu klopodas unuiĝi la homojn, instruante al ili unu saman helplingvon.

Hago, la rezidejurbo kaj la loko de la Kortego de Internacia Jugistaro, vidas tiajn signojn de internacia kunagado kun plezuro. Ĉi-tiu muzeo parolas en la sama maniero al la homoj de ĉiuj nacioj: ĉiuj povas kune ĝui la produktojn de la pentroarto kaj de la skulptado sen kompreni la saman lingvon; same la muzikiloj ĉi-tie kolektitaj produktas sonojn de ĉiuj samfacile komprenblaj; same efikas la artindustriaj produktoj el ĉiuj landoj. Ankaŭ ni, homoj, povas same ekoni la ideojn kaj la sentojn de la aliaj se ni nur havas universalan helplingvon kiun ni ne bezonas por

la arto. La Urbestro rememoras sian urbestrecon de Arnĥemo kaj ĝian Esperanto-domon, kaj kiel tiam, komence oficdeve sed rapide plezure, li trastudis grammatikon de Sro Heilker... « kies fotografajon vi vidas sur paĝo 5 de la kongreslibro ». Finante li esprimas la esperon ke nia kongreso povos helpi al pli bona kompreno, pli bona harmonio, do pli bona ŝato de la homoj sur ĉi-tiu nia planedo, kie ankoraŭ regas tiom da batalo kaj da envidado.

Ne malpli sprite Sro Heilker dankas la Urbestron pro lia afableco honorigi nin per tia akcepto; li profitas la okazon por ankaŭ danki Lian Ekscelencon Dron Deckers kaj Ing. Damme pro ilia aliĝo al la Honora Komitato kaj ilia grava subteno al la Esperantomovado.

Iam oni rigardis Esperanton kiel utopion, sed ĝi ne estis utopio; tiam oni rigardis ĝin kiel idealon, tia ĝi estas kaj tiu idealo nun estas vera realo. Tiu muzeo ja ankaŭ parolas internacian lingvon; la homoj jam eltrovis multajn ilojn kiuj mute parolas internacie. Tamen la parolaj rilatoj inter la popoloj estas neperfektaj. La internacia jamboreo ne kapablas krei fraŭan sferon pro lingvokonfuzo, la radio transpasas la limojn tra la tuta mondo. Baldaŭ venu la tempo por donaci Esperanton al pli vastaj rondoj de la popoloj, kaj kiam ĝi venas, tiam ni fidus, ke la urbestro de Hago forte helpos enkonduki la instruadon de Esperanto en la lernejojn de sia urbo. Li dankas la urbestron pro la solena akcepto en la bela urbo Hago, el kiu ni kunportos gravan impreson, precipe pro la fakto ke la urbestro salutis nin en nia propra internacia lingvo.

Ni tiam ekvizitis la riĉan muzeon... kaj ankaŭ la abundan bufedon — kelkaj eĉ iom troige la lastan —, kaj antaŭ ol foriri ankoraŭ trarigardis la De Groux, de Braekeleer, Leys k.a., kiuj ankaŭ venis Hagon por la aparta ekspozicio de la belga pentroskolo de 1805 ĝis 1916.

Je la kvina ni forlasis la muzeon kaj post iom da babilado eniris la sep aŭtobusojn kiuj daŭris atendi, probable Dio ankaŭ ne scias kion. Plie la ŝoforoj iom vojeraris kaj ni jam alvenis sufiĉe malfrue en la **JAMBOREO**: pro tio ni kvazaŭ enkuris la grandegan tendaron kaj, feliĉe baldaŭ helpata de nederlanda amiko, mi rapide trovis unu el la belgaj subtendaroj, kie mi esperis renkonti la ĉefalmoziston de la belga kontingento, kiu iam instruis al mi la belan universalan latinan lingvon: li momente estis « ie alie » — tien iras ĉiuj en la jamboreo kiam ili forlasas

sian propran tendon, kio rezultigas ke estas skoltoj ĉie —, mi interparolis iom kun samurbanoj kiuj unuanime ne rekonis min, sed jen alvenis la ĉefalmozisto gvidanta du belgajn ministrojn; tian renkonton mi certe ne atendis: afablaj vortoj kaj plia fotajo. Tiam mi iris al la ĉeĥa tendaro kie multaj el la kongresanoj ĵus grupiĝis ĉirkaŭ la tendarfajro: Sro Heilker alparolis la ĉeĥajn skoltojn pri la plifaciligado de la interfratiĝo per nia internacia lingvo kaj deziris al ili agrablan restadon en Nederlando: Sro Berka tradukis; la ĉeĥa muzikistaro ludis la Esperon kaj kvodlibeton pri nederlandaj melodioj kiujn ni kunkantis. Sed ni tiel jam pretperhasis la fermhoron de la Babelo, pardonu, de la Ĵamboreo, kaj, je ĝentila sed firma peto, rapide devis forlasi ĝin por reveturi Hagon.

MERKREDE je la 9,30a h., Dekano Jongen el Echt (Ned.) celebris por nia formortinta Prezidinto, Pastro Profesoro Font Giral, kiu martirmortis por nia S. Kredo la 17an de Aŭgusto 1936, MESON kun ĝenerala komuniĝo. P. Laan senprepre anstataŭis la predikonton kaj faris belegan predikon pri la vortoj de Kristo: « Vi ankaŭ devas atesti pri Mi », diritaj al la Apostoloj. Sed la apostoloj estis timantaj viroj kaj ili tiam ne kuraĝis atesti pri Li. Post la releviĝo de Kristo el la morto, ili denove kuraĝiĝis kaj multe preĝadis. Tiam venis la Sankta Spirito. Kaj ili rememoris la vortojn de Kristo. Kaj ili ekpredikis inter miloj da homoj kaj tiel daŭrigis. Kaj ili estas atestintaj, estas kaptitaj, frapitaj, sed atestintaj ĝis la lasta guto da sango, la lasta ekspiro. Ankaŭ ni devas atesti pri Kristo; ni havu la kuraĝon montri al la mondo ke ni estas Katolikoj; ni ne hontu; pri kio ni devas honti?; ĉu ni ne estas anoj de la internacio kiu ligas la ĉielon kaj la teron? Kristo mortis por ni; ni devas havi la kuraĝon diri kaj montri al ĉiuj ke ni estas kristanoj, katolikoj, kaj ni devas atesti pri Li, ankaŭ per Esperanto kaj kiel Esperantistoj.

Je la 10,30a h., Sro Heilker malfermis la ĜENERALAN KUNVENON de IKUE en ĉeesto de proksimume 130 personoj. Li dankas Dekanon Jongen kaj P. Laan kaj laŭlegas ankoraŭ kelkajn salutleterojn, inter kiuj unu de P. Kao.

Sro L. de Jong laŭlegas la raporton de la unua laborkunsido, post kio ricevas la parolon Sro Berka, ĝenerala sekretario - kasisto

de IKUE, por prezenti la SEKRETARIAN RAPORTON. Li akceptis tiun penan laboron por labori al la starigo de vere inda internacia unuiĝo kaj esprimas sian kontentecon pri la pasinta jaro dum kiu la membraro kreskis kaj okazis la transpreno de E. K. Por eldono de Sankta Skribo, nur plu restas la Evangelio de S. Luko por traduki, eble unu el la ĉeestantaj sacerdotoj sin prezentos por tiu laboro. La Katekismo de P. Bianchini aperis; la religia terminaro estas en preparo. Estas bona espero pri la financa vidpunkto. La enkonduko de Esperanto en porpastrajn seminariojn estas preparita. Eldoniĝis jarlibro 1937. Organize ni nun havas vere tutmondan organizadon. Eble baldaŭ novaj ligoj fondiĝos. Estonte la landaj ligoj sendu ĉiukvaronjare precizajn sciigojn kaj la izoluloj iĝu konsuloj de IKUE.

Sro Berka dankas al ĉiuj pro iliaj helpoj kaj konstatas ke IKUE denove kreskas.

Sro Heilker gratulas Sron Berka kaj persone dankas lin pro liaj fervoro kaj laboremo, li esperas ke ni eniru por ni novajn landojn. Li dankas Sron Brouwer pro la bonega redaktado de E. K. La eldono de nova jarlibro dependos de la stato de la kaso, pro tio ni abonu E. K. por havigi enspezojn. Povu ni duobliĝi antaŭ la venonta kongreso.

Prof. Dro Hewera (Ĉeĥoslovakujo) sia prezentas por la traduko de la kvara Evangelio.

Sro Berka prezentas tiam la FINANCAN RAPORTON PRI IKUE. La jaro estis kriza, pro la pasintaj travivaĵoj de nia unuiĝo kaj pro la ekonomia krizo tutmonda: landaj ligoj tute ne pagis de kelkaj jaroj. Pro tio la kaso estas preskaŭ malplena, sed ni ne havas ŝuldojn. La financa transpreno de E. K. ne jam finiĝis, ĉar mankas ankoraŭ kelkaj kalkuloj. Sekvas la buĝeto (kiun vi bonvolu legi en E. K. - Red.). La landaj kasistoj plenumu ĉiujn siajn devojn, tiel la estraro povos plenumi siajn taskojn je profito de ĉiuj.

Sro Aerts el Eindhoven demandas por transdono kiajn informojn Sro Berka bezonas el Eindhoven.

Sro Heilker anoncas ke oni nomos komisionon por kaskontrolo kaj proponas ke ĝi konsistu el tri nederlandaj membroj.

Tiam Sro Berka legas la raporton pri ESPERO KATOLIKA: ĉiuj, li diras, ĝin ŝatas certe; estas nun nia proprajo kaj despli

ni devas ĝin ami. Sed finance la novaĵoj nuntempe ne estas ĝojigaj. Kvankam la revuo nun tre plaĉas, ni nur malrapide regajnas la fidon. La abonantaro kreskis jam ĝis 830 sed ĝi devos nepre atingi 1200 por ke IKUE ne devu pagi mankojn por E. K. El 3.000 membroj tio devas esti ebla; oni do ĉie elklaru por tiu celo; la prezo estas malalta kaj certaj antaŭaj numeroj estas ankoraŭ aldoneblaj. Sro Berka dankas ĉiujn, sed ĉefe la ĉefredaktoron, pro ilia kunlaboro.

Frato van Zon ŝatus krucon en la stelo de la koverto; Sro Berka prizorgos tion. Frato van Zon ankaŭ rimarkigas ke aboni kolektive por grupoj ne estas la taŭga metodo kaj instigas al aparta abono.

Envenis perletera propono de Sro Leopold Chica (ĉefestraro/Wien) por presigi invitojn al abono sub formo de tiugfolio aŭ de poŝtkarto. Sro Heilker opinias ke tio ne multe efikas. Frato van Zon same kaj li difinas la bonan metodon: viziti, paroli, montri... kaj ne foriri sen la abono. Kelkaj membroj tamen apogas la ideon de nacilingva propagandilo. Sro Berka respondas ke ankaŭ sur poŝtkarto oni povus meti reklamon por E. K. kaj ke li povus ilin havigi malmultekoste; tiel li jam ricevis abonojn. Probable ĉiu havas pri tio apartan juĝon laŭ sia lando. Sro Berka eldonos la propagandkartojn. Sro Brouwer preparu la tekston. (Tiu jarkarto, tre plaĉaj, ĵus aperis. Kaj koston 1 fr. por. 5. - Red.)

Sro Heilker nomas la membrojn de la kaskontrola komisiono, Sroj Damen, de Jong kaj Ing. Stevens; Sro Berka sendos siajn librojn por kompleta kontrolo.

Tiam estas la propono de la ĉefestraro pri SANGO DE LA STATUTOJ, t. e. por aldoni al art. III: « La oficiala organo de IKUE estas «-Espero Katolika», fondita en 1903 de Pastro Emile Peltier ». Pasintjare ni ne jam povis proponi la enmeton ĉar la intertraktoj ne jam finiĝis, nun neniuj kontraŭstaro plu ekzistas, ĉar ni havas la posedkaj uzrajton notarie registritan kaj ni jure persekutos se iu en estonto uzos la nomon E. K. La propono estas unuanime akceptita.

Sekvas la pritrakto de la DETALA REGULARO: estas en ĝi du mankoj. Unue, estas neniuj devigo de kaskontrolo kaj ĝi ne okazis; ni fidis, sed, eble estonte, povas esti ankaŭ malbonaj homoj ĉe la kaso; la ĉefestraro redaktos artikolon.

Due, diras Sro Heilker, estas propono por mi mem, sed dum la diskuto kiu sekvas li pliampleksigos ĝin al la tuta ĉefestraro: temas pri la estonta rajto je repago, kompreneble nur se estas financa kapableco, almenaŭ de ia kongresaj vojaĝkostoj, ĉar nun ili havas krom la tutjara laboro kaj la korespondaj-kostoj por IKUE, ĉiujn elspezojn por fari ĉiujare por la kongreso, ĉar ja la prezidanto kaj la sekretario estas ĉiam atendataj; estos kvitancoj kaj kontrolo; ĉar membroj kontraŭas aŭ tre hezitas pri enmeto de tia artikolo en la detalan regularon. Sro Heilker deklaras ke estas ankaŭ en la ĉefestraro malsamaj opinioj pri tio; li mem proponis kongresi dujare: Sro Golobič subtenas tiun ideon. Sro Berka finigas la diskuton dirante ke tiuj diskutoj estos superfluaĵoj kiam IKUE estos dekoble pli forta, kiel ĝi devas esti. La ĉefestraro redaktos artikolon kaj ĝin submetos al aprobo.

Por la ESTRARELEKTO estas neniuj kandidatoj; Sro Berka estas aplaŭde reelektata kaj gratulata de Sroj Heilker kaj Damen kiuj deziras ke li longe restu sekretario-kasisto de IKUE.

Sro Duffaud (Francujo) proponas sendi, okaze de la jubilea jaro, leteron al Monsro Dombrowski, Polujo, pioniro de la Katolika Esperantismo; aplaŭde akceptita.

Je la RONDDEMANDO, P. Ouwendijk faras plurajn detalajn demandojn, je kiuj Sro Heilker respondas i. a. ke el la esperanta devizo spesmilo nur plu ekzistas la nomo kaj ke ĝi ne estas dezirinda; ke pri la gvidfolio de Hago, la komitato de Hago interrilatos kun la fremdultrafika oficejo, tion ankaŭ petis Fr. van Zon; ke skribi ankaŭ fonetike la nomojn, almenaŭ de la estraro, en la jarlibro, okazigos ankoraŭ pli da konfuzo, oni simple demandu se estas dubo.

Sro Golobič petas provizoran malplialtigon de la IKUE - kotizo, de proksimume 30%, por sia ligo (jugoslava) ĝis kiam ĝi estos pli forta. Ĉar estas kontraŭstaro kaj ke tio estas instigo al aliaj landoj, Sro Heilker proponas rifuzon.

Sro Loeckx petas difini la kondiĉojn plenumotajn de Katolika Esperanto-Domo por povu ricevi moralan subtenon de IKUE; Sro Heilker respondas ke ni unue bezonas materialan garantion; tia entrepreno bezonas kapitalon; li klopodu ĉu li povas sukcesi kaj

vivi, poste ni vidos.

Sro de Jong proponas ke oni kolektu ĉiujn paroladojn de la kongreso por eventuale iel eldoni ilin; Dro Naster proponas ke pro ilia graveco oni almenaŭ disponigu al ĉiu en ilia plena teksto la pritraktojn de la du kongres-temoj. Sro Berka opinias ke, se ili aperas en E. K., do en nia oficiala gazeto, ili estos konservitaj por ĉiuj, eĉ se la numero devas iĝi iom pli ampleksa; li prizorgos tion.

F-ino Penzova, nome de la Ligo de Katolikaj Esperantistoj en Ĉeĥoslovakujo, insistas por rapida preso de la Sankta Skribo, ĉar la protestantoj ĝin eldonas; ni timu ke eble katolikoj ĝin aĉetos. Sro Berka diras ke ni havos la tradukon de la kvar Evangelioj kaj faras alvokon por ke sin anoncu kontrolantoj por la tradukoj.

Post tio la kunsido estas fermita per la kristana saluto.

(Daŭrigota)

NOMO.

Vraag en Antwoord

8. — C. L. el St. A. Kiamaniere oni devas esprimi ĉi tiujn kvar pensojn: broer en zuster; broers en zuster; broers en zusters; broer en zusters?

Antw. Indien men werkelijk wil aanduiden dat er één of meer broers, één of meer zusters bedoeld worden, moet men natuurlijk zooals in het Nederlandsch zeggen: frato kaj fratino of frato kaj fratinoj enz. Maar wanneer is het practisch noodig dat aan te duiden? Wanneer men tot meerderen spreekt is het niet noodig omdat dan toch ieder van hen begrijpt dat hij of zij er ook bij bedoeld is. Evenmin is het noodig als men over meerderen spreekt, want dan weet men toch genoeg wie er bedoeld worden, en, weet men dat niet, dan moet men dat toch nader aanduiden door naam of getal, zooals ook in het Nederlandsch; b.v. Johano, Maria kaj Anna, of unu sinjoro kaj du sinjorinoj. We kunnen zeggen dat gefratoj, gesinjoroj enz. bepaalde personen aanduidt of alle fratoj kaj fratinoj, alle sinjoroj kaj sinjorinoj, enz. In plaats van frato kaj fratino kan men ook zeggen la du gefratoj. (Men moet dan oppassen dat men bij terugvertaling niet zegt:

de twee gebroeders). Men kan dus practisch altijd (doch moet nooit) ge gebruiken wanneer men in 't Ned. geen naam of getal behoeft te geven. Uit hoofde van beleefdheid is het echter wat passender dat een heer die meerderen groet zegt; sinjorinoj kaj sinjoroj; en een dame; sinjoroj kaj sinjorinoj.

Een moeilijkheid zou kunnen bestaan bij het vertalen van E in het Ned. U moet b.v. uit een boek slechts enkele zinnen vertalen, waarin toevallig voorkomt gefratoj Jansen. Uit die enkele zinnen kunt U misschien niet opmaken of U broer en zuster enkel- of meervoudig moet nemen. Die moeilijkheid kunt U dan oplossen door te vertalen: de Jansens. Doch die moeilijkheid is practisch van geen belang. Verschillende andere moeilijkheden kan men nog uitdenken, doch daar ze slechts denkbeeldig zijn, verdienen ze geen aandacht.

9. — de la sama. Mi deziregas lerni paroli Esperanton, sed mi ne havas radion, kion mi devas fari?

Antw. Laat ik eerst opmerken dat om Esperanto te leeren spreken en verstaan (van spreken), er niet zooveel oefening vereischt wordt als voor andere talen, omdat E logisch en fonetisch is. Toch is wat oefening noodig: men moet leeren in Esp. denken om zich snel te kunnen uitdrukken en aan de klanken gewennen om ze snel te kunnen begrijpen.

Voor die twee zaken is de radio werkelijk zeer nuttig; voor het eerste helpt ze onrechtstreeks, voor het tweede rechtstreeks. Doch er zijn ook andere middelen voor iemand die geen radio heeft. N.l. het volgen van een Cseh-kursus (voor beginnenden vinden we een cursus met gemengd systeem beter; het bezoeken van ernstige konversatieavonden (tracht die in te richten met kath. Esperantisten uit uw omgeving - Gent?); veel aandachtig lezen, vooral hardop met nauwkeurige inachtneming v.d. uitspraakregels en zoo trachten de tekst niet uitsluitend van het zien te verstaan; U rechtstreeks inwendig oefenen en vooral... kongressen bezoeken. Maar... het is U toch zeker niet onmogelijk nu en dan eens bij een vriend of gebuur naar een Esp.-uitzending te gaan luisteren?

Los uw twijfels en moeilijkheden op door ze ter beantwoording op te sturen naar «Blankulo» per adreso Sekretariejo F.U.K.E. BORGERHOUT.

Nia movado

Amika Alvoko. Vi ĉiuj legis en la septembra numero, la «Grava Sciigo'n» sur la unua paĝo. Por tiuj kiuj eble ne legis aŭ jam forgesis ĝin, ni nur diras ke temis pri la kotiz-paĝo por la nova jaro.

Sekvantan monaton komencas nia 3-a jar-kolekto. Kiam ni kontente malantaŭenrigardas, ni ĝoje konstatas ke malgraŭ grandaj malfacilaĵoj, Flandra Katoliko tamen regule aperis, kaj se nur dependus de la sindonemeco de la redakcio, ĝi ankoraŭ aperus, se Dio helpas, dum 100 jaroj, sed ne sufiĉas laboremece aŭ sindonemeco sole (kiuj estas ja valoraj meralaj kapitaloj) sed ĉiu komprenu ke kiam aperas la lastjara numero oni pensu pri la pago de la kotizo, kaj tuja plenumo de tiu devo, kiu obligos la plueidonaden de nia kara Flandra Katoliko.

Pagu do tuj - atentu pri la diferenco inter la membreco al F.U.K.E. aŭ KVEV - ne prokrastu - ĝiru hodiaŭ kaj ŝparu al ni la egan laboron skribi la kvitancojn kaj al vi la necesan krompagon de 0.70 Fr. por enkasigo.

Subteno F.U.K.E. — Flandra Katoliko vere iĝas tro malgranda kaj ni volonte aldonus kroman paĝon se... ne mankas al ni la mono. Ni volonte akceptas la plej malgrandan subtenon — ne forgesu ke multaj brikoj faras domon — multaj frankoj ebligas al ni aldoni unu pluan paĝon al nia revuo.

Por ke la F.U.K.E.-anoj atente legu la

«Grava Sciigo'n» (J.V.D.) 5 fr.

Grava okazontajo

Gepatra espero 10 fr.

Amika preĝo

Dankon pro la bona solvo de la grava

problemo (F.U.K.E-ano) 5 fr.

Se ĉiu farus kiel mi, Flandra Katoliko

baldaŭ kreskus (J. G.) 5 fr.

Pro la senkaŝa raporto «Nomo» pri la

ĵamboreo (Skolto) 5.50

Pro la timema silento de la wilrijkano fr. 5 fr.

Ĝis la lasta franko (D. J.) 1 fr.

Prokrasto. Kelkaj kunlaborantoj kiuj sendis artikolojn bonvolu pacienci. Pro manko de loko ni estis devigataj prokrasti multajn rubrikojn. Ni publikigos ilin kiel eble plej baldaŭ. Se temas pri ne-originalaj artikoloj oni bonvolu aldoni la fonton.

Por nia Pesilo. Dua listo

Ni helpu la vendinstituton (J. G.) 5 fr.

Pro amika simpatio (J. V. D.) 5 fr.
I. K. I. Opdat wij gehoor mogen vinden in Mechelen 5 fr.

AAN ONZE LEDEN

die geen Esperanto kennen

en dus ons bericht op de eerste bladzijde van Flandra Katoliko N° 9 niet gelezen hebben, deelen wij mede dat levensduurte, uitbreiding onzer werkzaamheid, gemis aan verwachte finantieele steun, ons doen besluiten hebben de bijdrage voor 1938, dus vanaf 1 Nov. '37, te brengen op 15 fr. voor de K.V.E.V.-ers; inwonende leden 7,50 fr.

Wie echter vóór 25n Oktober betaalt, mag nog aan de vroegere voorwaarden voldoen: dus 10 fr., en voor inwonend lid: 5 fr.

Wij vertrouwen dat geen enkele onzer helpers ons hierom in den steek zal laten, vooral nu dat de propaganda intensief moet kunnen doorgaan. Dank bij voorbaat, vooral aan diegenen die ons niet zullen verplichten in de maand November een kwijting te laten aanbieden, natuurlijk dan ten bedrage van 15,70 fr.

BERICHTEN VAN HET VERKOOP-INSTITUUT. — Het winterseizoen is in aantocht! De lange winteravonden bieden U een uitstekende gelegenheid om U met de studie van Esperanto bezig te houden, en wij hopen, dat velen, zoo niet alle onze medewerkers zullen trachten veel leermateriaal te verspreiden. Wij verwachten ook veel van deze die een cursus inrichten. Leerboeken zijn er overvloedig voorradig en bestellingen kunnen onmiddellijk worden uitgevoerd.

EL DIVERSAJ LINGVOJ. — Een nieuw werk is wederom in het bezit van ons verkoopinstituut gekomen. Een korte beschouwing hierover vindt U elders in dit blad.

PROPAGANDA-TOCHT MAASSEN. — Door onzen sekretaris werd naar bijna al de in Vlaanderen verschijnende dagbladen een propaganda artikeltje gestuurd voor ons beknopt leerboekje door P. Maassen. De bijval mag schitterend genoemd worden. Een dertigtal belangstellenden vroegen ons om toezending dezer brochure, en wij hopen dat ze allen lid zullen worden onzer vereeniging.

EL DIVERSAJ LINGVOJ. — Er wordt ons soms gevraagd of we geen geschikt boek bezitten voor meer-gevorderden. Ziehier nu een uitstekend boek, dat als leesboek reeds uiterst boeiend is omdat het ons een prachtige brok brengt uit de Deutsche, Engelsche, Italiaansche, Nederlandsche, Spaansche, Fransche en Esperanto-literatuur. De spraakleer is volledig weergegeven onder den vorm van voetnota's, zoodat de leerlingen, zelfs beginners, dadelijk met de lezing van het verhaal aanvangen.

Een lijvig boek, uitgegeven door Esperanto Centra Kurso Nijmegen onder kundige leiding, waarvan de prijs, 20 frank, uiterst gering is.

Bestelt het voor de winterleergangen aan ons vendinstituto, postcheckrekening Nr. 11.94.82, van

D. Mortelmans, Egied Segerslaan 14,

Wilrijk.

JOZEF EN DOTAN. — Voor de liefhebbers van klassiek tooneel hebben wij enkele exemplaren van Vondel's bijbelsch drama «Jozef in Dotan» in esperanto-vertaling aangeschaft. Dit werk werd vertaald door de zorgen van het «Suda Kruco» en werd voor de eerste maal opgevoerd tijdens het kongres te Den Haag, alwaar het een overgrote bijval genoot. Wij verwachten menige bestellingen en zullen leveren zoolang de voorraad strekt. Telaarcomers zullen moeten wachten. Dus spoed U. Prijs : Frs. 13,50.

Tra la Gazetaro

Ĉi sube kopio de interesa letero, sendita al Uĝe-Eĥo de nia Prezidanto.

FLANDRUJO, EŬROPA LANDO

Mi dankas la redakcion pro ĝia mencio de tipa frazo el nia monata revuo, Flandra Katoliko, nome ke «la katolikoj estas bonaj patriotoj, kvankam ne ŝovinistoj».

Eble interesus la legantaron iom pli sciigi pri tiu malnova, malgranda lando, Flandrujo. Oni konas la flandrajn pentristojn : Rubens, Teniers, Van Dyck ; oni konas Erasmus ktp. kaj scias, ke ili estas flandroj.

Ni flandroj, staras verŝajne plej proksime al UĜE-programo : vidu, laŭ politika

vidpunkto ni volas kompletan neŭtralecon, nek apogon al Francujo, nek al Anglujo, nek al Germanujo. Kelkaj inter ni laboras por restarigi la antaŭajn Malaltajn Landojn (Dietsland) enhavantaj : la nunan Nederlando, Belgion, Luksemburĝon, la flandran parton de Nord-Francujo kaj Alsaco-Lorenon. Aliaj deziras intiman kunlaboradon kun Nederlando. Sed niaj rimedoj estas pacaj, kaj sendube forta, vasta lando inter Francujo kaj Germanujo malpermesos, ke unu el ambaŭ nin englutu : male, ni funkcios kiel peranto, rondigante la akrajn pintojn.

Ekonomie, ni, flandroj, estas por la Nordŝtatoj-Bloko, kvankam ni spertis antaŭ nelonge egoistan kontraŭecon de niaj kamparanoj. Kaj jen nia tasko : eduki nian popolon al eŭropa mentaleco : la unua rektoro de nia flandrigita Universitato prof. Vermeylen, iam diris : «Ni iĝu bonaj flandroj por fariĝi bonaj eŭropanoj».

Jen la tasko de UĜE - EĤO : montri al ni, ke la intereso de Eŭropo superas tiun de unuopaj ekonomiaj avantaĝoj, aŭ pli bone trovi solvon, por ke la malfermo de la doganmuroj ne mortigu pro malsato tutan regionon ; diri al ni «nu, vi ne daŭzigu semi tritikon, sed prefere plantu betojn, ĉar via grundo estas pli favora por tio, vi enlasu la danan buteron kaj brutaron, ĉar vi pli ekonomie povos dediĉi via al flegado de fruktarbejoj, ktp. Jen studado, kiu UĜE devas, laŭ mi, entrepreni ĉe ni, kie la ŝovinismo estas jam parte venkita, eble ĉar nia grandparte katolika popolo kutimas rigardi la aĵojn laŭ internacia vidpunkto. Sed ne frapu tuj al la monsako de niaj kamparanoj, ili estos surdaj.

Lingva vidpunkto : Certe la centjara altrudo de fremda lingvo, la franca, instigas nin al amo por la internacia eŭropa lingvo, kiu estos neŭtrala kaj deziras okupi nur duan rangon.

Fine, ni estas, pro la longaj suferoj dum la granda milito, ĝisfunde pacamantoj, ni ne havas kapitalon en armilfabrikoj, kaj do ankaŭ tiurilate simpatias la UĜE-movadon. Jen kelkaj ideoj de viaj flandraj amikoj, kiuj eble povas servi en la programefektivigo de UĜE.

Licenciato Leo Calloens,

prezidanto

de Flandra Unuiĝo de Katolikaj Esp.-istoj.